

KIEL RESPONDI KRITIKOJN KONTRAŬ ESPERANTO

D-ro Duncan Charters
Trésillac – Périgueux
sabaton la 28-an de majo, 2022
je la 18h00 – eŭropa horzono

- “Ekzistas neniu argumento kiun oni povas prezenti kontraŭ Esperanto kiun ne kapablas refuti klera, serioza, informita reprezentanto de la lingvo.”
 - – Prof. D-ro Ivo Lapenna, dum seminario de la Junularo Esperantista Brita en Oksfordo, 1963

*Fondinto de la Centro de Esploro kaj Dokumentado
Ĝenerala Sekretario kaj poste Prezidanto de UEA
Organizinto de la Rezolucio de Montevideo, 1954*

Elementoj de viva parolado, prezento

- La parolanto (sci-hava, preparita, memfida?)
- La ejo kaj okazo (sufiĉe granda, ne tro granda? akustiko, taŭgaj mikrofono / laŭtparoliloj?)
- La aŭskultantaro (kiaj homoj? (mal)junaj? edukitaj, kleraj? Dormemaj? (Ne)interesitaj?)
- La formo de la parolado (kiom longa? bildoj? interaga kun la publiko individue aŭ grupe?)
- La lingvo (ĉu la publiko perfekte komprenos?)

Retoriko

- Bona historio de la publika parolado en la verko *Retoriko* de Ivo Lapenna.
- Oratoro povis teni la atenton de la publiko dum 70 minutoj (sed memoru eĉ pli longajn oratoraĵojn de Fidel Castro), ekzemple en festparolado antaŭ publiko de la UK.
- Hodiaŭ, se vi ne povas diri kion vi volas komuniki en 18 (12?) minutoj, vi malsukcesis, fiaskis. (“TED”)

Respondo de Ivo Lapenna al peto

- Kiam Duncan Charters estis studento ĉe la Universitato de Cambridge, li verkis tekston por folio pri Esperanto por la tieaj studentoj: “What a University Student Should Know about Esperanto” (Kion universitatano sciu pri Esperanto)
- Li sendis la malneton al sekretario de BEA kaj al la direktoro de CED, D-ro Lapenna, por ke ili prikomentu kaj rekomendu. Revenis du tre kontrastaj respondoj.....

La du respondoj

1. “Vi ne bezonas ĉi tiun folion. Nia Asocio disponas pri tute adekvataj kaj allogaj informiloj pri Esperanto kiujn vi utiligu por informado inter la Kembriĝaj studentoj kaj ĉiuj aliaj celgrupoj.”

2. (Komentario akompananta amason da ruĝa
inko tra la tuta malneta teksto):

“Kiel vi scias tion?” “Ĉu vi povas pruvi, dokumenti tiun aserton?” “De kie vi havigis tiun statistikon?” “Kiel serioza universitatano, vi devas konscii vian moralan devon ĉion persone priesplori, kontroli; kaj komuniki nur kion vi mem kapablas pravigi.”

Atendu favoran aŭskultemon

- Radio-intervjuo en Washington, D.C. en kafeja studio kun Bill Harmon kaj Duncan Charters
- 2 antaŭaj intervjuitoj forte kritikitaj
- Komenco de la intervjuo pri Esperanto ŝajnis tute sama sinteno: primokado por agaci la “gastojn”
- Eĉ sen unua respondo, la intervjuisto sin reorientigis kaj diris: “Nu, se estus ĉi tie antaŭ jardekoj la fratoj Wright, mi certe primokus la eblecon flugigi homojn per maŝino tra la aero.”

Kiel prepari la vojon

- En via propra pensado, ne akceptu ke aliaj homoj neeviteble havas antaŭjuĝojn kiuj ne estas forigeblaj aŭ modifeblaj, aŭ ke ili ne deziras lerni de vi malgraŭ forta disputado.

“Argumentanto, disputanto ne estas malamiko”

Amu vian kunparolanton, amu la temon

“Sen amo, oni atingas nenion” (Julián Hernández Angulo)

Kiel prepari la vojon - 2

- Aŭskultu, aŭskultu, aŭskultu: komprenu la alian personon – kiu li/ŝi estas, kion li/ŝi supozas: ĉefa eraro estas pripensi sian respondon antaŭ ol bone kompreni la individuon kaj la kialon de la demandoj.
- Trovu bazon por kunsentado (ne = konsento).
Ora regulo: Se vi montris komprenon pri la interesoj kaj situacio de la kunparolanto, tiu estos poste preta aŭskulti pri viaj interesoj.

Respekto, respektemo

- Antaŭ ĉio, havu plenan respekton por via kunparolanto (eĉ se usonano...)
(ne pensu eĉ interne dum la interparolado:
“Azena demando!” “Kia stultul(in)o!”)
- Se eble, komprenu la vivmotivadon de via kunparolanto (esploru, enketu antaŭe se vi intervjuiĝos kun konata persono aŭ ĵurnalisto)
- Ne: propagandu, provu persvadi laŭ via opinio

Eblaj respondoj al saĝaj kritikoj

- (Ĉu Esperanto neeviteble disdialektiĝos?)
- Kia stulta demando! D-ro Zamenhof estis tiel brila kaj genia lingvisto ke li certigis ke tio neniam povos okazi en lia lingvo! Mi parolis kun multegaj esperantistoj el la tuta mondo, kaj tute ne rimarkis ian diferencon en ilia parolado. Ĉar Esperanto estas la plej bona internacia lingvo, mi garantias al vi ke esperantistoj neniam permesos ke tio okazu, dank' al Dio! Vi tute forgesu tion!

Eblaj respondoj al saĝaj kritikoj - 2

- (Ĉu Esperanto neeviteble disdialektiĝos?)
- Ĉu vi pridubas mian inteligenton? Esperanton oni kreis por FORIGI problemojn de lingva kaj dialekta miskomunikado, ne por plifortigi ilin! Tio estus tute kontraŭ la esenco kaj la spirito de Esperanto mem, do estas vera insulto kredi aŭ kredigi al aliaj ke la perfekta ilo por pace kunigi la homojn kaj forigi lingvajn diferencojn povus mem suferi de la fiaĉaj difektegoj de ĉiuj aliaj lingvoj!
Kondamninde – vi atentu kion vi diros estontece!

Eblaj respondoj al saĝaj kritikoj - 3

- (Ĉu Esperanto neeviteble disdialektiĝos?)

“Fakte vi pravas ke plej multaj esperantistoj certe ne parolas la lingvon sen la influo de la gepatra lingvo. Mi mem prezentas humurajn skeĉojn pri tio en Esperanto-Kongresoj. Tamen laŭ mia persona sperto, la nuna generacio strebas al prononcado kiu ne identigos ilin kun specifa etna lingvo aŭ nacio, kaj parto de la Esperanta kulturo estas montri ĝentilecon al aliaj kaj paroli kiel eble plej “internacie” aŭ sen-dialekte por maksimume facile komprenigi sin.”

Eblaj respondoj al saĝaj kritikoj - 4

- (Ĉu Esperanto neeviteble disdialektiĝos?)
- “La angla lingvo havas severan problemon pri disdialektiĝo. Multaj denaskaj anglalingvanoj de diversaj dialektoj ne povas kompreni la anglan lingvon de skotoj, baratanoj (hindoj) kaj aliaj. Tamen se la angla fariĝus la lingva-frankao de la mondo (aŭ unu el ili), fakuloj pri la kampo insistas ke oni devos konsenti pri iu pli neŭtrala kaj facila formo de angla lingvo kiun ĉiuj komprenus kaj uzus pli facile.”

Eblaj respondoj al saĝaj kritikoj - 5

- (Ĉu Esperanto neeviteble disdialektiĝos?)
- “Konsentite, ke tio certe okazus se en diversaj mondregionoj Esperanto vaste akceptiĝus kaj ĉiuj interparolantoj havus nur unu alian komunan lingvon. Tamen Esperanto ne celas esti la sole uzata lingvo de la mondo, sed lingvo kiu peras translingvan kaj transkulturan interkomunikadon konservante la valorojn de la etnaj lingvoj. Pro internaciaj kontaktoj tra la reto, la Esperanto-parolantoj daŭre praktikus ĉefe kun alilingvanoj.”

KRITIKAJ ASERTOJ KAJ DEMANDOJ

- La esperantistoj ne estas vera parolkomunumo, ili estas klubemaj hobiistoj.
- Esperanto ekzistas jam de pli ol jarcento, do vi evidente ne sukcesis persvadi la publikon.
- Vi diras ke Esperanto havas literaturon, sed certe estas nenio leginda kompare kun la grandlingvaj literaturoj kun siaj majstroverkoj.
- Esperanto neniam povos esti oficiale akceptita, ĉar la grandaj nacioj defendas sian lingvon.

KRITIKAJ ASERTOJ KAJ DEMANDOJ

- Esperanto estas baze latinida lingvo, do neniam akceptebla por Afrikanoj kaj Azianoj.
- Esperanto ne povas konduki al la paco, ĉar homoj disputas eĉ se ili havas saman lingvon.
- Kiom da Esperanto-parolantoj ekzistas en la mondo, kaj ĉu ili estas multe tro limigitaj?
- Lingvistoj diras ke artefarita lingvo ne povas esprimi ĉiujn nuancojn de la homaj emocioj.

KRITIKAJ ASERTOJ KAJ DEMANDOJ

- Estas grandega stultaĵo propagandi Esperanton kiam la mondo jam decidis ke la angla estos la internacia lingvafrankao.
- Esperanto ne estas facile lernebla, ekzemple multaj parolantoj ne regas la akuzativon, do oni devus draste ŝanĝi la lingvon por akcepto.
- La esperantistoj konstante batalas inter si, do evidente ne kapablas vivi siajn idealojn kaj montri bonan modelon de paca komunikado.